ESPERANTO

MONATA GAZETO DE E-HANDIKAPULOJ

INFORMILO 4

Aprilo 2016 Kol. 372/32

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

Enhavo: Deĉifri pralingvojn, Ŝakhistorieto, Nekutima velkrozado, Rememoro pri Miloš Lukáš, Finkalkulo, Invito al Grésillon, Ĉeĥaj Fervojoj, Spritaĵo

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

Deĉifri pralingvojn

Ofte oni komparas lingvojn kun vivantaj estaĵoj. Ili naskiĝas, vivas kaj mortas, ĉiutage mortas lingvoj en la tuta mondo. Kun tiuj lingvoj mortas kulturaj valoroj de la homaro, al kiuj oni ne plu povas aliri. Pro tio ekzistas fakaj lingvistoj, kiuj dediĉas multajn jarojn da pena laboro por deĉifri mortintajn lingvojn. Per tio ili eltrovas gravajn informojn pri la historio, koncerne kulturon, politikon kaj komercon de antikvaj popoloj; faka laboro tio estas.

La novaĵo estas, ke de nun komputila programo mirinde helpas en tiu laboro; oni alnomas ĝin „tempomaŝino“, ĉar ĝi faras dum kelkaj tagoj tion, por kio oni postulas jarojn da persona laboro. Oni provis la sistemon en Paskinsulo kaj la programo rekonstruis tiel nomatajn „protolingvojn“, de kiuj devenis lingvoj en Azio, Aŭstralio kaj regionoj en Pacifiko.
Esploristoj en la universitato de Kalifornio, en Usono, ellaboris tiun programon kaj publikigis siajn rezultojn: la komputilo sukcesis ripeti

la atingojn manfaritajn de lingvistoj kun 85% da kongruo. La programo uzas konceptojn de logiko kaj statistiko por rapide atingi la samajn rezultojn. La esploristoj testis ĝin ĉe pli ol 600 pralingvoj en la menciita regiono, surbaze de jam kolektitaj 140 000 vortoj.
Kurioze, ke la programo montras ankaŭ la estontecon de lingvoj, tio signifas, ke ĝi antaŭvidas la manieron, kiel lingvoj modifiĝos dum la tempopasado – asertas la esploristoj.

La komputila programo baziĝas sur la koncepto, kiu estas organizita laŭ la maniero simila al „genealogia arbo“, kun reciprokaj influoj de unuj lingvoj al aliaj. Laŭ tiuj „arboj“ la protolingvoj estas trunkoj kaj la modernaj lingvoj estas folioj. La proksima paŝo estas rekonstrui el la programo indianajn lingvojn en Nordameriko.

el retinfo

E-Ŝakhistorieto

Granda surprizo por la ŝakludanta parto de Nederlando: Viktor Korĉnoj, tiam la dua ŝakisto de la mondo, fuĝis el Sovetunio kaj trovis loĝejon en Amsterdamo, ĉe konata ŝak-familio.
Aŭdinte tion mi malkovris la adreson, ĉar ekestis en mi la ideo, organizi simultan-ŝakludon por la grandmajstro en Lopik, mia komunumo.

La ŝakklubo tie entuziasmiĝis kaj do kolekti 40 parto-prenantojn al la 40 ŝakbretoj estis facila komisio. Trovi taŭgan kaj dignan lokon por okazontaĵo ne estis malfacilaĵo: la kantino de la granda margarino-uzino "Gloro de Goŭda", kie nia ŝakklubo ludis siajn matĉojn tiutempe.
La direkcio de tiu uzino senhezite konsentis; la evento okazus sub ĝia aŭspicio. Nu, Korĉnoj venis, vidis kaj venkis: el la 40 partioj li gajnis

38 kaj perdis nur 2. La du ruzuloj estis profunde preparintaj specialajn ŝakvariantojn.
Mi mem perdis la partion, sed trovis rekompencon en tio, ke mi fariĝis la ŝoforo de Viktor. La konversacio kondukis al la temo Esperanto. Mi klopodis konvinki la grandmajstron pri la kompreneblo de la verda lingvo, parolante Esperante pormomente. Kun sukceso: li komprenis, kion mi diris. Sed li ne kredis, ke Esperanto trovos sufiĉe da akcepto en la mondo.

Mi nun proponis al li, ke mi sendu liajn salutojn al la familio en Leningrado. "Io tia estis absolute neebla!" Mi diris ke jes, tamen – kaj mi akiris la adreson kaj saluton kaj malgrandan mesaĝon. Nu, post kelkaj semajnoj mi ricevis poŝtkarton el Leningrado!
Kiel la maleblaĵo fariĝis ebla? Mi sendis la mesaĝon de Viktor al finnaj samideanoj! La finnoj ja perdis, post la mondmilito, la regionon Karelio. Konsekvence multaj finnlandanoj fariĝis enloĝantoj de Rusio. La mesaĝo estis transdonita al familianoj tie kaj ili do povis konfidi ĝin al la enlanda poŝto!

La Leningradan respondon mi sendis tuj al Francio, kie Viktor Korĉnoj partoprenis ŝakturniron en Evian. Post semajno mi ricevis dankleteron de Viktor - angle.
Posthistorio: Viktor Korĉnoj forlasis Eŭropon por Ĉinio, kie li promociis la ŝakon okcidentan. Nun Ĉinio disponas pri baterio de grandmajstroj. Poste li forlasis Ĉinion, fariĝis svislandano kaj ludis en la unua breto de tiu lando ĉe ŝak-olimpiadoj.

de J.M.van der Hoeven el Lopik, NL

xxxx

Nekutima velkrozado kun esperantistoj en la regiono de Ligurio

(nordokcidenta Italio)

Kvintaga ŝipvojaĝo, de la 1-a ĝis la 5-a de junio 2016, tra la Golfo de Ĝenovo, vizitante Portofinon, Sestri Levante kaj la Kvin Landojn. La jaĥto-estro estas multesperta itala velisto, ano de Grupo Esperanto-Tigullio kaj parolas Esperanton.

La partopreno estas malfermita al ĉiuj: kaj al velistoj kaj al novicoj. Ĉiu partoprenanto havos la eblon piloti la jaĥton kaj praktiki la velŝipajn manovrojn. Estas necesa la kunlaboro de ĉiuj por la navigado, la albordiĝo kaj la kuirado; tamen ne estas bezonata antaŭa sperto pri velŝipado. Vidu la programon:
http://www. nodobandiera.it/wp371/ attivita/2016-2/velado-por-esperantistoj/ Vidu ankaŭ: http://www.eventoj.hu/ 2016.htm
Bonvolu kontakti min por sciigi la disponeblon.
Amike Alessandro Mazzetti info@nodobandiera.it

sendis Jindřiška Drahotová

Rememoro pri profesoro Miloš Lukáš

La estimatan amikon, la universitatan profesoron Miloš Lukáš el Hradec Králové, mi konis el regulaj kunvenoj de la Centra komitato de Ĉeĥa E-Asocio, kie ni ambaŭ estis membroj. Se mi volas lin rememori post ĝuste kvardek jaroj, en mia animo mi vidas lian tre simpatian vizaĝon. Lia iom dika staturo kun ofta rideto en mi vekis plenan fidon. Eble ankaŭ mi estis por li simpatia, kvankam li estis multe pli aĝa — li povus esti mia avo.
Li nomis min Jaruška kaj li multfoje petis min, ke mi nomu lin „Mi-lošku“ kaj ne sinjoro profesoro. Sed mi tre hontis nomi lin tiel, por ke

ceteraj gesamideanoj ne pensu ion intiman en niaj rilatoj, ja mi estis tiel juna kompare al li. Do Miloš poste konsentis, ke mi nomu lin tiel, nur kiam ni estos sen aliulaj oreloj. Tamen li kelkfoje embarasis min, kiam li demandis min antaŭ aliaj, kial mi nomas lin tiel oficiale. Poste li humurmienis, kiam mi pro tio ruĝiĝis.

Foje en la jaro 1967 ni staris antaŭ komenco de la kunveno en grupeto de 5-6 komitatanoj kaj Miloš rimarkis larmojn en miaj okuloj kaj ploreman vizaĝon. Mi ne kapablis bone kaŝi miajn familiajn zorgojn. Li insistis, ke mi diru, kio okazis. Do mi poste private konfidis al li, ke post ege grava aŭtomobila akcidento mian edzon neniu volas operacii el la fakuloj. „Diplopion“ (duobla vidado) kun damaĝita grasa kuseneto sub la okulo – do la okulo lokiĝis pli sube – neniu kuraĝis.

Kaj mia edzo Mirek (Rybáček) de tiu tempo ne povis labori kiel konstrukciisto kaj pensis pri sinmortigo, ke li ne havas plu kialon por vivi, tute necerbumante, ke li havas familion kun du filinoj.

Miloš klopodis ĝojigi min kaj proponis, ke li vokos siajn ekslernantojn el la fakultato kaj se li sukcesos, li tuj telefonu al mi. Kaj vere — proksimume post tri semajnoj li telefonis, ke mia edzo vizitu la klinikon en Hradec Králové, ke lia lerninto doktoro Zoubek kuraĝos operacii lin.

La operacio estis ege grava kaj la kuracisto poste diris, ke el 1000 operacioj, kiujn li jam faris, nur kvar estis tiel malfacilaj. Kvankam mia edzo ankoraŭ longe malsanis, tamen la operacio estis sukcesa kaj post iom da tempo li povis reveni al sia profesia okupo.

Mi estis tre dankema al Miloš, ke li savis nin de la familia tragedio. Miloš mortis la 26-an de aprilo 1976. Mi partoprenis la funebroadiaŭon kaj ege bedaŭris lian forpason – kvazaŭ forirus mia plej kara avo.

Jarmila Rýznarová

Finkalkulo de AEH de la jaro 2015
kaj budĝeto por la jaro 2016

	budĝeto 2015	realo 2015	budĝeto 2016
Enspezoj			
vendo de varoj kaj servoj	0	37 680	0
interezoj el kuranta konto	10	11	10
dotoj, donacoj	5 000	20 000	30 000
membrokotizoj	23 000	30 060	30 000
seminarioj	0	5 910	6 000
ekskursoj	270 000	296 350	0
Sume	**298 010**	**390 011**	**66 010**
Elspezoj			
vendo de varoj kaj servoj	0	0	0
impostoj	530	0	0
materialo	18 000	10 351	15 000
gazetoj kaj libroj	1 200	50	500
riparoj	0	0	0
poŝto kaj telefono	23 000	24 645	25 000
kunvenoj	1 000	305	1 500
vojaĝelspezoj	2 000	1 152	5 000
banko	1 200	1 058	1 100
seminarioj	0	5 910	6 000
salajroj	0	0	1 500
ekskursoj (UK Lillo)	300 000	346 581	0
dotoj, donacoj	0	345	2 000
Sume	**346 930**	**390 397**	**57 600**
Enspezoj - elspezoj	**-48 920**	**-386**	**8 410**

Invito al Grésillon

La franca Esperanto-kastelo Grésillon invitas vin lerni kaj ferii.
2016-apr-08/16 : PRINTEMPaS, intensivaj **kursoj** kaj KER-ekzamenoj (B1, B2, C1) => http://gresillon.org/printempashttp://gresillon.org/printempas
2016-apr-20/24 : **Korusa** renkonto de *Interkant'* kaj **verkad**aliero *Krajon'-Ankro* => http://gresillon.org/koruso
2016-jun-12/17 : Luaro laŭ la vortoj, **turisma** semajno laŭ verkistoj => http://gresillon.org/s1
2016-jul-04/15 : Dektaga kurso pri la esprimo de la **tempo** en Esperanto => http://gresillon.org/s2

2016-aŭg-06/13 : SOMERAS, la Esperanto-**studad**-semajno post FESTO => http://gresillon.org/s3
2016-aŭg-21/28 : Festa semajno por **infanoj**, adoleskantoj kaj familioj => http://gresillon.org/s4
Kontakto: kastelo@gresillon.org, +33-2.41.89.10.34, http://gresillon.org/kontakto

Ĉeĥaj Fervojoj plimultigas vagonarojn sen obstakloj por handikapuloj

Ĉeĥaj Fervojoj *ČD* en sia nova horaro 2015/2016 entrafikigis 4656 trajnojn kun senobstaklaj pasaĝervagonoj, kio estas plej multe en la historio de *ČD*. Signife plimultiĝis ekzemple ebloj por vojaĝado de homoj en rulseĝo en Moravio. Ekzemple la trajnparo *IC Opava*, kunliganta nordmoraviajn urbojn *Opava, Ostrava* kaj *Olomouc* kun la

ĉeĥaj *Pardubice* kaj *Prago,* nove enhavas vagonon ekipitan por rulseĝoj.

Konstatinda estas ankaŭ kreskanta interesiĝo de handikapuloj por vojaĝado en trajnoj. En la unuaj dek monatoj de 2015 handikapuloj jam superis ĉiujn ĝis tiamajn rekordojn en vojaĝado kaj kreis novan rekordon en uzado de servoj de *ČD*. Unuan fojon en la historio povas esti venkita la limo de 5000 dum la jaro transportataj registritaj pasaĝeroj en rulseĝo.

El fervoja mondo 2/2016 Jindřich Tomíšek

Spritaĵo

Geedza paro ĉe la landlimo.
La edzo demandas la doganiston:
"Ĉu estas permesate kunporti ankaŭ oron trans la limo?"
"Memkompreneble" - respondas la doganisto.
"Ĉu ankaŭ 80 kilogramojn?" - demandas la viro.
"Ne, ne tia kvanto, certe NE!" - respondas la doganisto.
La viro turnas sin al sia edzino:
"Oro mia, bedaŭrinde vi devos resti hejme".

INFORMILO – monata gazeto por esperantistoj-handikapuloj + suplemento **ANTAŬEN**
Eldonas AEH – Asocio de esperantistoj-handikapuloj
Redaktoroj: J. Rýznarová, L. Srbová, J. Kosnar
Adreso: Svaz zdravotně postižených esperantistů, Na Okrouhlíku 953/21,
530 03 PARDUBICE, CZ tel. **466 611 941** SKYPE : jary_esperanto
e-mail: **aeh@esperanto-aeh.eu** interreto: **www.esperanto-aeh.eu**
Bankovní spojení: Poštovní spořitelna, číslo účtu AEH **192150088**, kód banky **0300**
Při platbách vždy uveďte vaše členské číslo (nad vaší adresou) jako variabilní symbol!
Roční předplatné časopisu Informilo = 200,-Kč, příspěvek svazu dobrovolný.
La jarabono de Informilo 15 €. Kodo ĉe UEA: aehk-z
La redakcio ne ĉiam havas la saman opinion kiel la aŭtoroj de la artikoloj.